

ESPERANTO-KULTUR-CENTRO

(CENTRE CULTUREL ESPÉRANTO)

Statutoj

Registritaj ĉe la Prefektejo de Haute Garonne

Artikolo 1: NOMADO

Estas kreita inter la membroj de la nunaj statutoj asocio regata de la leĝo de la 1-a de julio 1901, kun la titolo:

ESPERANTO-KULTUR-CENTRO (Centre Culturel Espéranto)

Artikolo 2: CELO

La Esperanto-Kultur-Centro laboras por pli egaleca kaj solidara mondo, pli libera kaj klera homaro, pli inkluziva kaj respektema socio, kaj pli justa kaj efika komunikado – per Esperanto kiel unua elekto kiel internacia lingvo.

La Esperanto-Kultur-Centro laboras kun la civila socio kaj la Esperanto-movado:

- por konigi Esperanton, antaŭenigi ĝian lernadon kaj uzadon.
- por kuraĝigi rilatojn kaj interŝanĝojn inter homoj de malsamaj kulturoj kaj lingvoj.
- por faciligi kaj kunordigi la agadojn de la diversaj Esperanto-asocioj en la regiono de Tuluzo.

Artikolo 3: VALOROJ

La bazaj valoroj de la Esperanto-Kultur-Centro estas horizontaleco, solidareco, egaleco, kultura kaj lingva diverseco, respekto, inkluziveco, paco kaj ekologio.

Artikolo 4: SIDEJO

La sidejo estas lokita en Tuluzo.

Ĝi povas esti translokitita per decido de la ĝenerala asembleo.

Artikolo 5: MEMBROJ

La asocio konsistas el aliĝintoj, kiuj pagas jaran kotizon, kies sumo kaj kondiĉoj estas fiksitaj de la ĝenerala asembleo. La asocio estas malfermita al ĉiu persono, kiu akceptas ĝiajn statutojn kaj deziras kontribui al ĝiaj celoj. La membreco ĉesas pro:

- Demisio.
- Ne-renovigo de la jara kotizo.
- Eksigo decidita de la ĝenerala asembleo pro grava kialo, post kiam la koncernato estas aŭdita.

Artikolo 6: RIMEDOJ

La rimedoj de la asocio konsistas el:

1. La kotizoj.
2. Subvencioj (publikaj aŭ privataj).
3. Sumoj ricevitaj kiel kompenso por la servoj ofertitaj de la asocio.
4. Ĉiuj aliaj rimedoj permesataj de la leĝo.

Artikolo 7: KOLEKTIVA ESTRARO

La asocio estas administrata de kolektiva estraro kun almenaŭ du kunprezidantoj, elektitaj de la ĝenerala asembleo. La membroj de la estraro plenumos sian mandaton ĝis la sekva ĝenerala asembleo kaj povas esti reelektitaj.

Ĉiu kunprezidanto rajtas laŭleĝe reprezenti la asocion. En kazo de juraj procesoj, la membroj de la estraro enpostenaj dum la faktoj prenos kolektive kaj solidare sian respondecon antaŭ la kompetentaj tribunaloj.

En kazo de vaka pozicio, la estraro provizore plenigas la postenon. Definitiva anstataŭigo okazos ĉe la plej proksima ĝenerala asembleo.

Artikolo 8: ĜENERALA ASEMBLEO

La ĝenerala asembleo inkluzivas ĉiujn membrojn de la asocio.

Ĝi kunvenas almenaŭ unu fojon jare kaj ĉiufoje kiam la kolektiva estraro aŭ kvarono de la membroj tion petas. Almenaŭ dek kvin tagojn antaŭ la fiksita dato, la membroj de la asocio estas invititaj de unu kunprezidanto. La tagordo estas indikita en la invitoj kaj povas esti amendita per konsento.

La ĝenerala asembleo, unufoje jare, decidas pri la morala kaj financa raporto prezentitaj de la kolektiva estraro.

Ĝi modifas, se necese, la internan regularon, nomumas kaj renovigas la membrojn de la estraro, kaj fiksas la sumon de la jaraj kotizoj. Por ŝanĝi la statutojn aŭ dissolvi la asocion, estas postulata du-triona plimulto, reprezentante almenaŭ unu trionon de la membroj.

Artikolo 9: INTERNA REGULARO

Interna regularo povas esti redaktita de la kolektiva estraro kaj poste aprobita de la ĝenerala asembleo. Tiu regularo celas difini la punktojn ne pritraktitajn en la statutoj, precipe rilate al la interna administrado de la asocio.

Artikolo 10: DISSOLVO

En kazo de dissolvo decidita de la ĝenerala asembleo, unu aŭ pluraj likvidantoj estos nomitaj de ĝi, kaj la aktivo, se ekzistas, estos asignita al asocio kun similaj celoj.